

Philippe Suchard (2) fondinto de ĉokolad-fabriko, la industriisto kaj ŝipkapitano

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-847/337, 1980 januaro 03 kaj 05
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1980-51/SRI-1980-51-B-4-337-847-1980-01-03-05-Claude-kaj-Andree-Gacond-Philippe-Suchard-2-fondinto-de-ĉokolad-fabriko-la-industriisto-kaj-ŝipkapitano.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.



La pasintan semajnon ni rakontis pri la junaĝo de Philippe Suchard, a fondinto de ĉokolad-fabriko, kiu ĉiam portas lian nomon. Interalie ni raportis, ke li forlasis dekvinjare la vilaĝon Boudry apud Neuchâtel, kie lia patro estis estro de kafejo, por lerni la germanan lingvon en Lenzburg, plenumante dommastrumajn laborojn por pastoro. Li poste lernis la sukeraĵistan profesion ĉe frato en Berno. Per la mono ŝparita dum ok jaroj li faris en 1824 sesmonatan fulmrapidan vojaĝon tra Usono, antaŭ ol instaligi en la urbo Neuchâtel, kreante sukeraĵojn, kie li interalie fabrikis ĉokoladon. Li tiam estis 29-jara.

A.- Philippe Suchard estis tro entreprenema por longe resti en sia magazeno plenumante ĉiutage la saman laboron. Dum li knedis la ĉokolad-kremaĵon, li imagis mekanikajn rimedojn por faciligi kaj rapidigi la laboron. Post unu jaro li jam estis preta por industrie produkti ĉokoladon, kaj li akiris muelejojn, kiu estis aĉetebla en la najbara vilaĝo Serrière pro ekonomia krizo en la muelista aktiveco. Helpe de la akvoforto de la rivero li funkciigis kned-maŝinon, kiu estis kapabla produkti tage tridekon da kilogramoj de fajna ĉokolado. Estis vera liberiĝo de teda kaj temporaba tasko.

Cl.- Sed ne ĉio iris glate. En la sama domo loĝis tajloro, kiun la senĉesa tintado de la mueleja akvorado malhelpis dormi. Iun vesperon, kiam Philippe Suchard forlasis la laborejojn, la tajloro iris kaŝe fermi la kluzopordon por senmovigi la radon. Fine li kviete dormis. Matene li relevis la pordeton por refunkciigi la mekanismon. Tiam aŭdiĝis terura bruoj, kiel se io rompiĝas.

A.- Revenante labori Philippe Suchard trovis veran katastrofon. Dum la nokto pro la paneo la ĉokolad-kremaĵo malmoliĝis, kaj kiam la akvo revenis matene rompiĝis ne nur la transmisi-rimenoj, sed ankaŭ la ĉefaj partoj de la maŝinaro. Ĉio estis rekonstruota. Tiu riparo kostis pli ol dek-mil frankojn, en la momento kiam la investado por la kreo de la fabriko estis ne kovrita. Tamen, la entreprenema Suchard ne perdis sian optimismon kaj entreprenemon. Li profitis la rekonstruon por alporti al la maŝino perfektigojn, kio fine rezultigis kvalitan kaj kvantan kreon de la ĉokolad-produktado.

Cl.- Tiam ne estis facile vendi ĉokoladon. La ekzota deveno de tiu produkto vekis ĝeneralan malfidon kaj ĝia alta prezo etigis la aĉetantaron. Philippe Suchard reklamis per plej variaj rimedoj celante tre precizan klientaron kaj baldaŭ la aristokrataj familioj de Neuchâtel formis fidelan aĉetantaron. Tiam la kantono Neuchâtel ne nur estis svisa teritorio, ĝi samtempe estis princa posedaĵo de la prusa reĝo. En 1842 alvenis mendo de la reĝa kortumo en Berlino, kaj parto de la produkto de la fabriko komencis eksportiĝi al Pruslando.

A.- La ĉokolado Suchard iom post iom konkeris vend-teritorion kaj la tuta familio streĉe laboris. Philippe Suchard edziĝis en 1828, du jarojn post la kreo de la fabriko. Lia edzino

fariĝis lia plej kompetenta helpantino, transprenante la gvidadon de la entrepreno, kiam la edzo forestis. Baldaŭ la gefiloj ankaŭ transprenis respondecojn, prizorgante la korespondadon, librotenadon, pakadon kaj dekoradon. Iom post iom dungitoj aldoniĝis al la labortacmento.

Cl.- Sed Philippe Suchard ne estis rutinema. Tuj kiam la fabriko kontentige funkciis kaj la magazeno en Neuchâtel ne bezonis plu lian ĉiutagan ĉeeston, revekiĝis lia vojaĝemo. Okaze de sia vojaĝo en Usono Philippe Suchard estis fariĝinta admiranto de la novaj vetur-rimedoĵ, interalie de la vaporŝipoĵ. En 1826 ligna vaporŝipo komencis navigi sur la lago Neuchâtel, sed ĝiaj proporcioĵ estis tiel neadekvataĵ, ke ĝi neniel kontentige funkciis. Kontraŭe sur la Ĝeneva lago la vaporŝipo «Wilhelm Tell» tute sukcese veturis. Ĉirkaŭ 1832 Philippe Suchard decidis funkciigi sur la lago Neuchâtel similan vaporŝipon. Li ĝin mendis al la pariza ŝipinĝeniero François Cavé kaj rikoltis la necesan kapitalon mem garantianta ties trionon.

A.- Oni malfacile povas imagi ĉiujn venkotajn malfacilaĵojn. Unue la posedantoĵ de la velŝipoĵ, kiuj ĝis tiam garantiis la var-transportojn, vigle kontraŭstaris la novan veturrimedon. Siaflanke la aŭtoritatoĵ trudis rigorajn teknikajn kontrolojn provante eĉ malpermesi la uzon de altprema vaporkaldrono. Philippe Suchard ĝojige trovis apogon flanke de grafo de Pourtalès, kiu estis membro de la princlanda registaro.

Cl.- La lanĉado de la ŝipo okazis la 19-an de julio 1834 kun la entuziasma partopreno de la loĝantaro. Philippe Suchard mem stiris la ŝipon. Dum dekkvar jaroĵ li plenumis tiun funkcion de ŝipkapitano, veturigante la vaporŝipon inter Neuchâtel kaj Yverdon sur la lago Neuchâtel, kaj post la konstruo de kanalo irante eĉ ĝis Bielo sur la najbara lago. En tiu epoko ĉiu kantono posedis propran dogan-sistemon. La veturareo de la vaporŝipo, kiun Philippe Suchard nomis Industriŭla, etendiĝis al kvar dogan-teritorioĵ, kaj por garantii akuratan horaron, la ŝipkapitano devis ofte lukti kontraŭ la doganistoj, kiuj pedante plenumis sian funkcion provante kaŭzi malhelpojn al la vojaĝantoĵ. La ofteco eĉ de la konfliktoj kun la doganistoj kaŭzis la popularecon de la ŝipkapitano Philippe Suchard.

A.- La unuaj maŝinistoj kapablaj funkciigi la vapormaŝinon venis el Francio kaj Britio. Ili havis neordinaran manieron sentiĝi sian superecon. Iliaĵ pretendoĵ estis senlimaj. Ekzemple, belan dimanĉon, okaze de ekskurso al Nidau ĉe la lago Biela la mekanikisto tute simple anoncis, ke al li ne konvenis reveni la saman tagon al Neuchâtel, kaj la 240 pasageroj estis devigitaj tranokti en Bielo.

Cl.- Tre plenan vivon havis la ŝipkapitano Philippe Suchard. Frumatene li vizitis siajn du entreprenojn en Neuchâtel kaj Serrière, kaj poste li stiris sian ŝipon ĉu al Yverdon, ĉu al Bielo. Post la reveno li okupiĝis pri la librotenado kaj pri aliaĵ taskoj. Sed tio ne sufiĉis al li, kiel ni vidos la venontan semajnon.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond parolis pri la neordinara vivo de Philippe Suchard. Ĝis reaŭdo!